De Stokholmo ni trajne vojaĝis al Helsingborg por partopreni la svedan E-kongreson 18.-20.5. Pri la kongreso eble en Esperanto-lehti. Ni tranoktis en junulargastejo. Meze de la dua nokto fajroalarma ellitigis nin ĉiujn kaj multaj eldomiĝis sur la straton hazardmaniere vestitaj kaj timigitaj, konfuzitaj. Tamen evidentiĝis, ke la alarmo estis elektra eraro.

Unu vesperon K. kaj mi ŝipis al Helsingör por tie pasigi kelkajn horojn en la malnova urboparto. Ni rondiradis serĉante restoracion konvenan al ni kaj, fuĝinte el brua bierejo, kie neniu atentis pri ni, ni eniris "italan" restoracion plenenan de klientoj. Tie ni trankvile kaj komforte vespermanĝis intergajaj sed ne bruaĵoj homoj ĉe kandellumo.

De Helsingborg ni vojaĝis al la universitata urbo Lund fondita ĉ. la 1000a jaro, kie K. siatempe studis. Tie ni tranoktis en solena malnovstila hotelo. Ni multe promenis en parkoj kaj mi lernis koni folioarbojn, kiuj ne estas kutimaj en Finnlando: fago, frakseno, ulmo, kverko. Ni admiris la lumon kribratan tra la foliaro. Ie kreskis ankaŭ rara "Nasztukoarbo", sur kies branĉoj pendis kvazaŭ blankaj naztukoj.

Ni vizitis la grizan sabloŝtonan katedralon (partoj de ĝi datiĝas de la 11a jc), muzeojn, lokojn, kiujn K. konis en siaj studentaj jaroj. Mi ĝojis, ke mi sufiĉe bone komprenas skribitan svedan kaj elturniĝas en muzeoj sen tradukanto. La universitato de Lund estis fondita en la 17a jarcento, por ke svedaj studentoj ne plu iru studi en Danio, sed restu en sia propra lando. La suda parto de nuna Svedio iam estis parto de Danio. Tio influas ankaŭ la dialekton eĉ nun.

Poste ni vojaĝis al Höör. Tie ni deziris viziti la konstruaĵojn, kie la gepatroj de K. havis librovendejon, sed nun tie estis vestaĵovendejo. En la nova librovendejo la posedanto prezentis al ni la eblecon legi libron sur elektronika tabuleto. Interese, sed eble ni trovis tion tro moderna maniero kaj niaj kapoj preferis la paperajn

volumojn. Kerstin vizitis la tombron de siaj gepatroj kaj aliaj familianoj. Esperanto estas longa tradicio en ŝia familio.

Ni tranoktis en bela trankvila loko Stiftsgården Åkersberg, kie ni havis ĉambron en la teretaĝo. Antaŭ nia fenestro kreskis grandaj fagoj, kaj iom pli fore viziteblis Kapelo de Paco. Tie mi ekbruligis kandelon memorante ĉiujn miajn E-geamikojn, precipe la afrikajn. En Åkersberg situas ankaŭ junulara gastejo. La mebloj estas malnovaspektaj, ĉio estas harmonia kaj trankviliga. La tuta entrepreno estas premiita pro sia ekologia sinteno.

Ni daŭrigis nian vojaĝon al Åhus, marbordo kie la familio de Kerstin iam havis somerdometon. Ni senpermesite iris sidi en ĝia korto en pinarbaro. Kerstin rakontis pri siaj tieaj someroj en la infaneco. Ni tranoktis en hoteleto sur la strando. El nia fenestro ni vidis la preskaŭ malplenan longan plaĝon, longan ĝeteon, bluan vastan maron kaj maljunan solecan pinon, kiun mi fotis. Kvankam la marakvo certe estis nur 10-13-grada, iu viro longe naĝadis kaj plonĝadis en ĝi. Sur la plaĝo ludis infanoj kun gepatroj kaj kelkuloj sunumis sin.

La suno leviĝis ĉ. la 4a horo el malantaŭ la pino. Mi gvatis ĝin por foti. Kelkajn vojaĝojn ni faris per busoj, aliajn per trajnoj. En Svedio la vojaĝanton trafas la malfacilaĵo, ke ĉiuj vojaĝoj devas esti antaŭpagitaj. En neniu veturilo oni pagas per kontanta mono. Sen Kerstin mi neniam estus trovinta la lokojn kie aĉeti la biletojn kaj la haltejojn de diversaj buslinioj kaj la horarojn de diversaj trajnokompanioj.

Ni vojaĝis tra Kristianstad al Kalmar. Ĝi estas urbo bone konata en Skandinavio pro historiaj kialoj, ĝi estas fama Hansa-urbo, kaj tie la regantoj de Nordio ligis pakton nomatan Kalmar-unio en la 14j. La kastelo, pli precize fortikaĵo, datiĝas de la 12a jc. Ni vidis ĝin nur de ekstere. Ni promenadis en mirindaj parkoj, kie floris bulbofloroj en elegantaj



bedo. La plej ĝuinda estis japaneska ĝardeno, kie birdetoj flugadis de branĉeto al branĉeto, jen kaj jen baniĝante en lageto. Ni tranoktis en impona Urba hotelo (Stadtshotell), kie ni havis kaj dormoĉambrojn kaj vivoĉambrojn!

En la muzeo ni vizitis ekspozicion pri Jenny Nyström, pentristino, pri kiu mi sciis nur, ke ŝi faris multajn bildkartojn kristnaskajn.

Fakto



Jill Hillford kaj Kerstin Rohdin dum la ekskurso

ŝi vere estis kaj kian vivon ŝi havis, vivtenante tutan sian familion per sia arto. (La edzo estis malsana.)

La sekva haltloko estis urbeto Högsby, kie Kerstin loĝis dum dudeko da jaroj kun sia esperantista brita kunulo, verkisto, artisto Harold Brown. Ilia Flava Domo sur la rivero Em akceptis multajn E-gastojn. Ni rigardis ĝin de la kontraŭa bordo de Em. Ni piknikis en herbejo. Kerstin renkontis unu du konatojn.

Ni daŭrigis al Oskarshamn, kie ni vespermanĝis ĉe esperantistino kaj tranoktis en la junulargastejo de la Popola Altlernejo. Ni vizitis muzeon, kien nin logis kolekto de lignaj skulptaĵetoj de DÖDERHULTARN, viro kiu priskribis la vivon de frua 20a jc., entombigojn, nuptojn, familian vivon, malriĉon, hejmbestojn ktp. Feliĉe mi komprenis ĉiujn tekstojn kaj povis sendepende rondiri.

De Oskarshamn ni busis al Stokholmo, ĉirkaŭ 5-hora vojaĝo tra bela kamparo/arbaro en suna vespero. Ni bonŝance sidis en la supra etaĝo de la buso, en la unuaj seĝoj. Apud ni junulo preskaŭ la tutan vojaĝon fingrumis sian komputilon, ne atentante pri la vidaĵoj, sed ni ĝuis la pejzaĝojn, interparolante. Ankaŭ ni iom fingrumis la poŝtelefonon de K., ĉar ni deziris lerni trovi la tekstomesaĝojn, kiujn mi estis sendinta al ŝi kaj ŝi ne trovis. Ni

kunlabore sukcesis kaj fieris, ke ni maljunulinoj lernas uzi modernajn komunikilojn. La telefono de K. estas svedlingva kaj la mia finnlingva, sed ni lernis kion fari. Ni ĉiam parolis en Esperanto, preskaŭ same flue kiel en niaj gepatraj lingvoj. Mi tute ne kapblas PAROLI la svedan, kvankam mi dum multaj jaroj lernis ĝin en lernejo.

En Stokholmo mi ankoraŭ pasigis unu tagon kaj duonon ĉe mia amikino. Ni vizitis la malnovan urbocentron kaj luksan muzeigitan hejmon en parko, iom ekster la urbo, kie siatempe loĝis iu Princo Eŭgen. Li estis pentristo-artisto. Lian domegon nun ornamas ne nur liaj kaj alies artaĵoj sed ankaŭ abundaj floroj en potoj kaj vazoj, kun elegante kombinitaj koloroj. Ni manĝis en la Princa kuirejo salitan salmon kaj trinkis kafon kun kuketo.

Ĉio en suda Svedio pensigas min pri la longa kaj riĉa historio de la lando. Ŝajnas ke ankaŭ la naturo tie estas pli riĉa, pli fekunda. Mia Finnlando estas malpli dotita, tamen mi amas mian landon kaj admiras (ĉu ankaŭ envias?) Svedion. Kerstin rimarkigas, ke norda Svedio pli similas Finnlandon.

Saliko

Serĉado pri tempo pasinta

Ekzistas du amikinoj-esperantistaj, kiuj deziris montri unu al la alia iom pri siaj antaŭaj vivoj. Unu el ili devenas de la sudo, el lando kun "folio-arboj", kiel fagarboj, padusoj kaj fraksenoj. La alia devenas de la nordo, el lando kun vastaj pin-arboj kaj 188.000 lagoj, preskaŭ 200.000! Unu jaron ili vojaĝis suden, lernis pri pli ol miljaraj preĝejoj, pri fekundaj ebenaĵoj, pri milda naturo. Tiun ĉi jaron ili kune vojaĝis al la ekzotika nordo por same travivi la etoson de la fruaroj de Saliko kaj de ŝiaj lastaj profesiaj jaroj. Mi, la sudlandano, kiu ne multe vizitis la landon norde de Stokholmo, estis plena da scivolo.

Ni ekvojaĝis per trajno de Hyvinkää, urbo norde de Helsinki, al granda urbo Tampere, 250.000 enloĝantoj kaj grava fervoja konektejo. Buso portis nin dum tri horoj tra vastaj pinarboj laŭlonge kelkaj el la multaj miloj de grandaj enarbaraj lagoj al Virrat, la naskiĝloko de Saliko. Ni tranoktis en moderna feriado kurscentro en apartamento bone ekipita per porcelano kaj kuirpotoj diversaj. Kompreneble la domo situis sur lagobordo, tiel ke eblis ĝui kolorplenan, ravan sunsubiron en la akvo ĉiun vesperon. Ni povus remi aŭ pagaji, kiam ni volus. Nenion el tio ni profitis, sed ni profitis meze en septembro la eblecon kolekti ruĝajn ribojn por

prepari al ni bongustan deserton. Ligite al la ferienda centro situas malnova, sed bone renovigita pastorejo. Plurloke la eklezio vendis pastorejojn al diversaj feriaj aŭ edukaj centroj. La kostoj flegi la malnovajn domojn tro pezas al la eklezia ekonomio.

Najbare situas bele organizita, subĉiela folkloro muzeo kun malnovaj farmoj, ventmuelilo, gastejo – manĝejo. Ni manĝis tipe finnan manĝaĵon en la malnova gastejo, kie iam loĝis la patrino de Saliko. Saliko rakonte vivigis la okazintaĵojn de sia propra infanaĝo, kaj ankaŭ tiujn de siaj gepatroj. La farmdomoj, kiuj jam en frua tempo situis dise en la kamparo kun la kampoj ĉirkaŭ la domoj, estis

kelkfoje tre grandaj, ĉar ja estis multe da spaco en la lando. Oni ne kreis vilaĝon, kiel en pli sudaj landoj. Vilaĝoj kreiĝis poste, kiam oni bezonis "vendoplacojn", kiuj iom post iom similigis al urbetoj, en kiuj kreskis butikoj divers-specaj, bankoj, eĉ apoteko, en kiu iam laboris la patrino de Saliko. Ni estis invitataj en farmodomon malnovan, kies posedantoj ricevis parton de la pago de la ŝtato por renovigi malnovstile la domon, kiu longis 27 metrojn. Ŝajne oni bone zorgas pri sia antaŭa kulturo en Finnlando.

Mi aŭdis multajn rakontojn pri la laboro en la malnova farmo, kiun posedis la gepatroj de Saliko. Ni ĉirkaŭiris en la domo, en kiu multaj ĉambroj kaj anguloj retenis sian malnovan stilon kaj arkitekturon. Saliko rakontis kiel laboris kaj vivis gepatroj kaj kvar infanoj, ŝi rakontis pri la bovinejo, montris malnovajn ilojn. La posedaĵo ne plu estas farmo, sed la bofratino de Saliko loĝas en la domo, kiun ŝi plenigas per malnovaj aĵoj, kiuj interesas ŝin. Ŝi preskaŭ kreis muzeon en la stalo kaj bovinejo. La patro de Saliko, la farmisto laboris kiel pedelo en la preĝejo ĉiun dimanĉon. Lia tasko ankaŭ estis kolekti eklezian imposton. La vivo de la knabineto antaŭ 70 jaroj dum la rakontoj denove plenigis la ĉambrojn, kaj mi ĉion ensorbis. Ni vizitis la preĝejon, granda, ligna kun helaj koloroj. Ĝi estis konstruita 1774 de needukitaj terkultivistoj. Mi povis aŭskulti la historion de la preĝejo en la sveda lingvo per aŭskultiloj. Finnlando estas oficiale dulingva kaj en publikaj kaj oficialaj situacioj oni devas laŭleĝe uzi la du lingvojn – la finnan kaj la svedan.

La "vendovilaĝo" Virrat krom la granda preĝejo havas novan, belan bibliotekon, lernejojn kaj butikojn, sed la ĝenerala etoso de pluraj etaj vilaĝoj kaj urbetoj de fino de la 19-a jarcento ne povas sekvi la modernan evoluon, sed donas impreson de loko, kiun la tempo preterpasis. Ekzistas pluraj tiaj en Skandinavio kaj Eŭropo, eble en pli da landoj.

Vespere ni ĝuis belan kaj instruan naturpromenadon laŭ lago kaj kanalo. Post kiam ni lernis pri bestoj kaj plantoj ni rigardis la alvenantan krepuskon super la lago la lastan vesperon

en Virrat.

Venontan tagon ni daŭrigas pli norden al la urbo Karleby (Kokkola finningve) en Ostrobotnio ĉe la Balta Maro. Tiu marborda urbo eble plej prosperis dum la unua duono de la 19-a jarcento, kiam grandaj velŝipoj ankaŭ el Finnlando trafikis la mondajn marojn. Al Karleby ili portis porcelanon el Fora Oriento, io, kio donis riĉecon al la ŝipposedantoj, kiuj konstruis al si grandajn domojn kaj donis prosperon al la urbo. Karleby estis fondita en 1620 de Gustav II Adolf. En la urbo konserviĝas la plej vasta kaj neŝanĝita ligna urbo de Finnlando. Karleby havas 46.500 enloĝantojn. El tiuj 6.300 (14%) estas svedlingvanoj, kiel oni diras. En la tuta regiono Meza Ostrobotnio estas 44.000 svedlingvanoj. Ostrobotnio situas vidalvide de Okcidenta Botnio en Svedio. (Finnlando kaj Svedio estis unu lando ĝis 1809). La enmigrado de Svedio komenciĝis plejparte en 1200-1300. Poste la homoj migris laŭ la riveroj enlanden. En Ostrobotnio la lando forte leviĝis, 8 mm ĉiun jaron. La haveno de Karleby devis ofte esti translokigita. Apud la riveroj estas fekundaj kampoj, sed inter ili vastaj arbaroj sur sablo, inter kie miksiĝas multaj marĉoj.

La bone konservita ligna urbo-parto "Neristan" ankoraŭ montras al la vizitanto la vivon dum la 17-18-aj jarcentoj. Dum sia historio la enloĝantoj devis batali kontraŭ fajro inter la lignaj domoj kaj akvo pro la ŝanĝiĝanta marnivelo. Nun restas la "urba markolo" en centra parko kiel memorilo pri la iama marnivelo.

Bonŝance la decidintaj politikistoj ne permesis konstrui modernajn altdomojn, sed retenis la historian atmosferon kun la pli etaj domoj kaj kortoj de maristoj kaj manlaboristoj en la urbo-parto "Neristan". En la suda parto "Oppistan" situas la grandaj loĝejoj de grandkomercistoj kaj ŝipposedantoj. Multaj domoj havas lignajn ornamaĵojn, por montri, ke la urbo estis bonhava kaj riĉa. La urbanoj ankaŭ hodiaŭ vive partoprenas en la socio, ofte kiel verkistoj aŭ artistoj – la nuntempaj "manlaboristoj". La kortoj inter la domoj kondukas vin al pli fruaj jarcentoj. Oni skribas, ke la fama "ora tranĉo" de Leonardo da Vinci estas uzata en la arkitektura

planado de la urbo Karleby. La urbo ankaŭ ludis sian rolon en la Krimea milito. En la parko oni montras unu el la britaj boatoj, kiuj estis kaptitaj dum tiu milito.

En la 17-a jarcento venis komercisto, Aspegren, el Östergötland en Svedio al Karleby. La mono kolektiĝis en liajn poŝojn kaj li konstruis UNU el la plej grandaj domoj de la urbo. Liaj posteuloj fariĝis pastoroj. La belega domo dum la jarcentoj ludis diversan rolon, kelkfoje privata lernejo, kelkfoje infanvartejo kaj lernejo por etuloj, kelkfoje paroĥa kunvenejo. Nun ĝi estas privata hejmo de Aspegren (posteulo en la sepa generacio de li, kiu iam enmigris). Dum la somero ĝi funkcias kiel hotelo. La eklezio vendis sian domegon al privata familio pro ekonomiaj kialoj.

Saliko volis mendi por ni ĉambron por tranokti, sed ne eblis, ĉar la hotelo funkcias nur somere. Ni tion ne sciis kaj sonoris ĉe la pordo. S-ro Aspegren malfermis kaj rakontis sian historion al ni. Ni povis vidi la grandajn salonojn en bongusta maniero plenigitajn per belaj malnovaj aĵoj. Nun li kaj lia edzino laboras kiel verkistoj kaj redaktas librojn, laboras pri historio kaj kulturo en sia urbo. Ili estas svedlingvanoj. Dum nia vizito ili parolis svede kun mi kaj finne kun Saliko.

En Karleby vivis fama paroĥestro en la 1770-aj jaroj, Anders Chydenius. Li aranĝis publikajn koncertojn kun famaj komponistoj el Eŭropo. Ili venis kun la finnaj velŝipoj, kiuj komercis ĉie en Eŭropo kaj en la mondo. Gudro estis tre valora varo, kiu kreis la regionon la plej prosperan kaj riĉan en la lando. Tion oni ankoraŭ vidas, vizitante domojn kaj muzeojn en la regiono. Ekde 1968 okazas en apuda komunumo la plej fama folklormuzika



Malnova urbodomo en Karleby/Kokkola

(Wikipedio)

festivalo en Eŭropo. Kelkaj komunumoj havas kanteleon en siaj blazonoj. Multaj famuloj en la finnlanda historio devenas de tiu ĉi loko; Johan Ludvig Runeberg, la nacia verkisto, Johan Vilhelm Snellman, politikisto kaj filozofo, Zacharias Topelius, fabelverkisto, familio Donner (Jörn Donner, fama verkisto), Kaarlo Juho Ståhlberg, la unua finna prezidento.

La svedlingvanoj kreis asocion LUCKAN ekde 2001 por protekti kaj evoluigi la svedan lingvon kaj kulturon. Inter multan alian laboron ili eldonis broŝuron pri verkistoj svedlingvaj en Ostrobotnio. Ĝi enhavas liston de pli ol 200 verkistoj, kiuj ankoraŭ nun vivas kaj laboras. Multaj verkis poemojn kaj poemarojn, sed kelkaj verkis ankaŭ romanojn pri siaj vivoj en ĉemaraj urboj kaj pri la naturo. Oni rimarkas en la tekstoj sopiron al la kulturo estinta kaj al la naturo. Mi citas poemeton de Jens Engqvist.



La Muzeo de Renlund

(Wikipedia)

*Havi la eblecon posedi
Ĉi tiun matenon
Libera kiel infano
Precize tie ĉi
Kie maro kaj strando
Renkontiĝas Por momento
Esti parto
De la sereno,
Kiu ĝin brakumas.*

Kie maro kaj strando renkontiĝas 1989

Kelkaj el la grandaj, riĉaj domoj nun servas kiel muzeoj, restaĵoj aŭ estas uzataj por aliaj celoj. Ni manĝis en iu malnovstila restoracio, kiu havis grandan surfacon subtere. La Muzeo de Renlund montras la vivon dum antaŭaj tempoj en Karleby. Ni ricevis multajn informojn pri la ŝipoj, kiuj veladis al foraj maroj.

Mi neniam vidis tian primaran muzeon kaj ĝi tre interesis min. Ĝi bone rakontis pri la kresko de graveco kaj riĉeco de la urbo per eksporto de gudro kaj importado de aĵoj de Fora Oriento kaj de Eŭropo, sed ankaŭ la bataloj kontraŭ ŝtormoj kaj naturaj fortoj.

Alia parto de la muzeo prezentas verkojn de fama finna pentristo, Veikko Vionoja, naskita 1909. En liaj kreaĵoj la lumo ludas grandan rolon. Li pentras kaj desegnas motivojn pri etaj farmoj. La bildoj estas plenaj de trankvilo en diversaj momentoj de la diurno. Ekde la 1950-aj jaroj la kubisma stilo ekkreskis en liaj bildoj. Liaj bildoj ekde 1960-1980-aj jaroj kaj daŭre ludas gravan rolon en la finna arto. La pendigado de la bildoj estis tre lerte farita. Vizitante la muzeon mi trovis angulon, de kie videblis pluraj pentraĵoj. Mi povis sekvi la etoson kaj la trankvilon radii de motivo al motivo. Veikko Vionoja estas interesa nova konato.

La nokton en Karleby ni travivas en la "Malnova Pastora Hejmo". Ankaŭ ĝi estis siatempe vendita al privatulo pro ekonomiaj kaŭzoj de la eklezio. Granda domo en granda ĝardeno iom ekster la urbo. Kelkaj ĉambroj de la domo similis al la ĉambroj en la filmo "Fanny kaj Alexander" de Ingmar Bergman. Kelkaj mebloj estis vestitaj en blanka tolaĵo. En la vitra verando oni povis manĝi kaj imagi, ke oni sidas en la ĝardeno. Ĉiu angulo, ĉiu muro, ĉiu breto estis plenaj de aĵoj kiel en malnova loĝejo. Tamen kion mi tre aprezis estis tio, ke la lito estis bona kaj ke ekzistis libroj en nia dormoĉambro. Antaŭ ol endormiĝi mi iom legis en iu libro pri Don Camillo. Mia patro laŭtlegis el ĝi por la familio dum sabatvesperoj en mia junaĝo.

Eĉ pli norden kaj enlanden. Sub iom da pluvo ni buse vojaĝis al la vilaĝo Lestijärvi, kie Saliko loĝis dum 20 jaroj kaj laboris en apud-urba gimnazio. Ni tranoktis en du-ĉambra apartamento, kiun la komunumo luis al vizitantoj, ĉar ne plu estas hotelo en la vilaĝo. En la vilaĝo situas preĝejo iom pietistinfluita, eta urbodomo, kelkaj dise lokigitaj domoj. Ĝi aspektas iom dezerta, norda vilaĝo. Ne eblis vere manĝi en nia apartamento, sed amikino de

Saliko afable lasis nin kuiri en sia domo, dum ŝi mem vizitis viramikon, kiun ŝi trovis dum dancvespero. La aĉetintoj de la domo de Saliko afable montris al mi la enon de la domo, kiu situas inter la lago Lestijärvi kaj la arbaro.

Do, kion oni faras en la vilaĝo Lestijärvi, se oni estas vizitanto? Mi estis interesita pri kiel aspektas la loko, kie mia amikino loĝis dum 20 jaroj. Se oni loĝas tie, kion oni povas fari? Aŭ labori en alia loko, aŭ eble en la sama vilaĝo, ekz en lernejo, esti buskondukisto, leterportisto kaj disdoni poŝtaĵon veturante per aŭto 200 kilometrojn ĉiun tagon, aŭ esti pensiulo. Se oni estas viro eble oni povas ĉasi aŭ fiŝkapti. Lestijärvi apartenas al tiuj multaj lokoj, kiuj prenas sian lastan spiron, klopodas vivteni sin per memoroj, muzeoj folkloraj de antaŭaj tempoj. Laŭ la lago estas 600 somerdomoj. Kion oni faras en tia loko, kie ne videblas multaj homoj, kie eble la diservo kelksemaĵa estas la "amuzaĵo" por kelkaj homoj? Oni devas ŝati la naturon. Oni devas ŝati ordigi kaj kreskigi en siaj belaj ĝardenoj plenaj de fruktoj, beroj, floroj. Oni devas ami kolekti berojn kaj fungojn en la vastaj arbaroj kaj prepari ilin por bongusta vintra manĝo al la familio. Aŭ hazarde vi devas esti pentristo aŭ verkisto, kiu povas vivi en alia mondo. Kion mi faris tie? Mi multe aŭskultis al Saliko, kiu rakontis pri ŝiaj promenadoj laŭ la lago, pri ŝiaj travivaĵoj kaj pensoj en la bela ĉirkaŭaĵo. La arbaro konsistas de altaj pinarboj kreskantaj sur sabla ebenaĵo tipe por Ostrobotnio. Inter lagoj kaj marĉoj situas kelkloke fekundaj kampoj.

Mi ŝatas la naturon. Mi iom plukis mirtelojn. Mi iris sur la molaj padoj laŭlonge de la lago. Ĉiumomente la lumo ŝanĝiĝas inter la trunkoj – lumo brilanta sur rektaj, belaj pinarbaj trunkoj estas io, kio plej tuŝas miajn sentojn. La sunradioj ludas sur preskaŭ senmova akvosurfaco. Kelkfoje venas venteto kreante etan ondon. Sed la ondoj ne lekas rokon, kiel ofte okazas, ĉar estas sablostrando. Iu ĵeteo. Ni eliras sur ĝin kaj vidas la sunbrilon ludi surfunde, sukcenkoloraj cirkloj dancas. Kelkloke iu malnova balanĉbenko aŭ lulseĝo proksime

staras ĉe la akvo. Ni sidas tie en somera varmo, kvankam la kalendaro montras mezon de septembro. Kiel bonŝancaj ni estas pri la vetero! Kune ni ĝuadas la belan kreaĵon de dio. Ĉu li/ŝi pli bone sukcesis ol la homoj? Mi ensorbis la odoron de la arbaro. Mi ĝuis la akvosurfacon de la vasta lago kun ie kaj tie etaj insuloj. La vagado laŭ la lago estas pli sankta ol nia mallonga vizito al la diservo en la preĝejo. Dio ankaŭ parolas al la homo per la naturo. Dankon, mia kara amikino, ke ni kune povis sekvi la bordojn de la lago Lestijärvi!

Dimanĉe vespere ni aliĝis nian preskaŭ eksterteran travivaĵon per reiro al civilizita mondo. Post sep horoj de buso- kaj trajno-vojaĝo ni atingis Hyvinkää iom antaŭ noktomeze.

En Hyvinkää Saliko loĝas en agrabla kvartalo en duetaĝa brika domo kun pinarboj ekster la fenestroj, tiel ke oni sentas sin loĝi en la finnaj arbaroj. Iun tagon ni vizitis la Vendoplacon en la centro de la urbo. Pli ol en Svedio, ŝajnas al mi, ke oni vendas lokajn fruktojn, legomojn kaj berojn. Multe vendiĝas nun mirteloj kaj vakcinioj. Ni faris ekskurson per la aŭto de Piia al la terpeco, kie Saliko kultivas legomojn kaj florojn. Tiun tagon estis pluva, griza malseka vetero, kio montris la "kolonipecojn", kie jam la aŭtuno atakis, en iom trista vesto. La terpeco situas 5 kilometrojn for de la loĝejo, do estas granda laboro prizorgi ĝin.

Tagon, kiam la suno denove brilis kaj la mondo denove montris sin en finsomera vesto, ni promenis al rivero Vantaa – la rivero de kiu la flughaveno portas sian nomon. Larĝa, bela valo kun fekundaj kampoj je unu flanko kaj

nordiaj rapidfluo kaj altaj piceoj aliflanke. Bela promonado!

Dum vesperoj ni reciproke laŭtleĝis. Ni legis memor-rakontojn de infanaj tempoj en Neristan en Karleby, ĉarmajn rakontojn pri infantempoj de la komenco de la 20-a jarcento, aŭ ni legis libron, en kiu finna knabino sendita al Svedio dum la milito, rakontis pri siaj spertoj en Svedio kaj kiam ŝi estis resendita al Finnlando. Saliko donis al mi tiun libron. Aŭ ni legis pri "Esploroj de Vivoĝojo" de Degučĭ – pri filozofio de Oomoto.

Unuan tagon en Hyvinkää ni estis invititaj de la paroĥo partopreni busvojaĝon ĉirkaŭ la urbo. Estis interese, ĉar la urbo estas tre vasta, sed la diversaj kvartaloj situas dise. Ekzistas multaj modernaj, belaj loĝkvartaloj. En unu el ili ni estis invititaj partopreni 45-jaran datrevenon de unu el la filoj de Saliko. La centro de la urbo ŝajnas esti konstruita dum la 1960-aj jaroj kiam la arkitekturo estis malbela. Oni tamen nun konstruis grandan, novan "supermarket" kun multaj butikoj, sed malmulte da aĉetantoj, belan, novan bibliotekon, parkon kun statuoj omaĝe al Helene Schjerfbek, kiu ĉirkaŭ dum dudek jaroj loĝis en Hyvinkää. Granda tabulo memorigas pri Donner, la fondinto de teksfabriko, kiu fondis kaj vivigis la modernan urbon. Tiu fabriko ne plu ekzistas. Nun la liftofabriko KONE mondkonigas la urbon Hyvinkää. Kvankam la tereno ebenas ĉirkaŭ Hyvinkää, ili konstruis skiejon kun deklivo en arbaro nomata "Sveitsi".

En la centro nun situas multaj, agrablaj, etaj restoracioj. En unu ni ĝuis bongustan fiŝon rigardante la kolorajn, aŭtunajn foliojn ekster la fenestro. Pluraj grandaj grizaj vilaoj, lignaj kun segitaj, blankaj ornamaĵoj ĉirkaŭ fenestroj kaj pordoj restas de la tempo, kiam Hyvinkää estis someruma loko. En unu la loka organizo de artistoj kreis ekspoziciejon por la lokaj pentristoj.

Ni vizitis la plej grandan ekspozicion, kiu okazis pri Helene Schjerfbek omaĝe al 150-jara datreveno de ŝia naskiĝo (1862-1946) en Ateneum, la nacia arta muzeo. Helene Schjerfbek estas unu el la plej famaj artistoj en Skandinavio. Jam 11-jara ŝi povis ekstudi en la lernejo de Finna Arta

Asocio. Dum sia vivo ŝi kreis pli ol mil artaĵojn. Oni sekvas la evoluon de Helene Schjerfbek en la 1880-aj jaroj, kiam ŝi pentris kaj desegnis multajn majstrajn portretojn de sia patrino kaj de infanoj. 1902-25 ŝi loĝis en Hyvinkää. Tiam ŝi evoluis en pli modernistan stilon – pli simpligitan. Dum siaj lastaj jaroj ŝi "dialogis" kun majstroj en la monda arto ekz El Greco, kio videblis en la ekspozicio. Laste oni vidis kelkajn el ŝiaj 40 memportretoj. Ili pli kaj pli montris kiel malsano kaj morto invadis ŝian korpon kaj vizaĝon ĝis en la fino ŝi estis detruita. Ŝi mortis en Svedio 1946.

Sur la Granda Placo ekster la muzeo kaj la Granda Preĝejo oni dum la jaro, kiam Helsinki estis "desegna ĉefurbo" finkonstruis la "Kapelo de Silento". Tiu projekto estas kunaranĝo inter la paroĥo kaj la urbo de Helsinki. Estas kapelo por Silento, konstruita en formo de granda ovo interne kaj boato ekstere. Ĝi estas konstruita per kurbigitaj alnobretoj. Sidante en ĝi, oni sentas sin ĉirkaŭtenita de granda ovo – eble oni novnaskiĝas fore de la bruaj urbo kaj mondo. Ni retenis en ni la bonfartigan senton de silento dum longa promonado laŭlonge de la bordo. Sur la akvo velis malnova "lerneja" ŝipo kun multaj veloj. Bela natura artaĵo! Perfekta fino de perfekta kaj enhavoriĉa tago.

Kompreneble ni parolis esperanton tutan tempon – dum du semajnoj preskaŭ tagojn kaj noktojn. Ne diru, ke ne eblas paroli esperanton. Mi rapide komprenis, ke mi devus terure multe labori por kapabli paroli finnan lingvon. Mi atingis ĝis "yksi, kaksi, kolme, neljä, viisi" = unu, du, tri, kvar, kvin!

La lastan tagon Saliko kreis lumfeston por ni du en la korto. Ni havis multajn kandelojn, "vivantan fajron" manĝis kaj trinkis dum krepusko ĉirkaŭis nin. Fine ni saŭnumis – la plej sankta faraĵo en Finnlando.

Tiel finiĝis mia konatiĝo kun Finnlando. Mi multon spertis kaj multon lernis dum mia vizito en mia najbara lando.

Kerstin Rohdin

Malrapide vi antaŭen paŝas. Preskaŭ senspuraj Montras sin viaj agoj dum la vivo Baldaŭ forgesotaj ili forflugas. Kie vi rikoltos tion, kion vi semis Laŭ la vojo peza, kiun vi serĉante vagis? Por iri la vojon krutan kaj malfacilan Nepras, ke vi havu bonŝancon. Longa estas la vojo Ĝis vi atingos la rozan ĝardenon.

Ernst V. Knappe:
1873 – 1929
Pensoj en la nokto



Helene Schjerfbek 1890 (Vikipedio)

Zofia Banet-Fornalowa

Komence de septembro mi ricevis leteron de Zofia Banet-Fornalowa. Ĝi kiel kutime rakontas tion, kion ŝi faras, kion ŝi verkas. Eble ŝia energio estis iom malpli granda ol mi konas ĝin, tamen ŝi petis, ke La Espero aperigu informon pri ŝiaj lastaj verkoj ekz "Omaĝe al Aleksandro Silbernik." Mi kunportis ŝian leteron por respondi al ĝi dum mia vojaĝo en Esperantolando. Meze de septembro mi relegis la leteron de Zofia kaj komencis respondi, sed neniam estis tempo forsendi ĝin. Ĉu mi skribis al ŝi, dum ŝiaj lastaj tagoj en la vivo? Kiam mi kelkajn tagojn pli poste hejme en komputila mesaĝo legis pri ŝia forpaso, estis granda ŝoko, ke mia amikino Zofia ne plu estas en tiu ĉi mondo. Mi ne volis tion kredi. Mi kredis, ke Zofia ne povis morti, mi kredis, ke ŝi eterne vivas. Kaj ŝi ja tion faras. Ni ĉiuj, ŝiaj geamikoj, ni ĉiuj, kun kiuj ŝi kunlaboris, memoros ŝin viva, energia, kapabla.



Jam komence de la 1980-aj jaroj ni renkontiĝis kaj renetis kontakton ĝis nun. Mi lernis koni tre kapablan kaj bonkoran amikinin. Ni faris multajn laborojn kune, multajn de ŝiaj prelegoj, plurfoje pri Janusz Korczak mi interpretis. Ŝi faris profundan esploron

pri li. Ŝia prelego pri lia vivo kaj verko estis kortuŝa. Same ŝiaj verkoj pri Zamenhofs familia. Zofia Banet-Fornalowa faris multajn vizitojn en Svedio kaj ĉiam ŝi volis labori kaj dividi kun siaj samideanoj kaj kun sia publiko el siaj grandaj konoj, pri siaj studoj kaj esploroj pri esperantaj pioniroj. Tre densan kunlaboron ni faris unu semajnon komence de la 1980-aj jaroj en Örebro, kiam ŝi faris 16 prelegojn dum kvin tagoj. En lernejoj ŝi rakontis pri polaj lernejoj, aŭ pri Janusz Korczak. En seminario ŝi prelegis pri la pola edukado fariĝi laboranto en infanvartejo. En UN-societo ŝi prelegis pri la Varsovia geto. En la Urba Biblioteko ŝi prelegis pri la moderna pola literaturo. Antaŭ ĉiu publiko la temo estis adaptita al la aŭskultantaro. Kia laboro, kia energio "liveri" tian divers-specan prelegsemajnon. Post tiu laborsemajno ni hejme faris etan festenon. Tiam mia dekjara filo dancis kun Zofia. Ĝis la fino de sia vivo ŝi memoris tion kun danko, ofte menciis tion en siaj leteroj.

Poste Zofia kaj Jerzy fariĝis tre bonaj geamikoj kun Harold Brown, mia kunloĝanto dum multaj jaroj kaj esperantlingva verkisto. Ni plurfoje vizitis la hejmojn de unu la aliaj, diskutis programojn kaj kunlaboron. Zofia kaj Harold kune verkis la teatraĵon "La Jubileo" por celebri la centjarigon de la Esperanto teatro. Tiu teatraĵo "La Jubi-

leo" estis prezentita 1996 dum KEF en Kopenhago. Ĝi ricevis grandan laŭdon kaj estis prezentita dufoje antaŭ plena salono.

Alia kortuŝa evento, kiu montras la korvarmon de Zofia. Ŝi verkis eseon pri la verkado de Harold Brown. Ĝi aperis en "Eduko Danĝera" 2006. Zofia kaj Jerzy Fornal partoprenis la In memoriam-ceremonion de Harold Brown 2004. Zofia prelegis pri lia verkado kaj Jerzy faris tre vivan prezentadon de la teatraĵo "Vagabondo", verkita de Harold. La publiko estis plene kaptita. Ĝi kvazaŭ vidis Jerzy kaj Harold (kvankam ne plu vivanta) kune roli sur la scenejo.

Mia kara amikino Zofia, ripozu en paco! Mi memoras kaj repensas pri ĉio, kion vi faris. Mi pensas pri ĉiuj jaroj, kiam ni kunlaboris kaj amikinis. Dankon por via serioza laboro! Dankon por ĉio, kion vi donis al la mondo!

Al la leganto!

Uzu la eblecon aĉeti, legi kaj lerni pri nia esperanto historio ekz en la libroj:

LA PEREINTOJ IN MEMORIAM
ZAMENHOF-FAMILIO
OMAĜE AL ALEXANDER ZILBERNIK

"Ni devas koni pri nia historio", tiujn vortojn Zofia ofte diris. Ni ne forgesu niajn pionirojn. Ni ĉerpu el la fontoj de Zofia Banet-Fornalowa.

Kerstin Rohdin

[...]

La familio, ekde la prahistorio, formis la fundamenton de la socio. De ĝia strukturo kaj internaj rilatoj dependis grave la progreso de la homaro. Aparte grava estis kaj daŭre estas la rolo de la familio en la vivo de tiuj naciecoj, kiuj pro historiaj kaŭzoj kaj diversspecaj perfortoj, perdis siajn ŝtatojn kaj vivas, kiel minoritato, diasporo.

Tia sorto trafis la judojn, kiuj dum pli ol 2000 jaroj estis devigitaj vivi kiel diasporo en ŝtatoj kun kristana, islama kaj alireligia plejmulto. En multaj el tiuj landoj ili frontis divers-specajn persekutojn ekde diversaj reprezentoj kaj leĝaj limigoj ĝis pogromoj. Ĉio ĉi kaŭzis necertecon kaj humiligojn diverskarakterajn.

[...]

Tamen pleje al stabileco, sekureco kaj entute bonfarto kontribuis, favoris, laŭeble la familio.

Tio supre skribita klarigas ankaŭ fenomenon, kiu ligiĝis kun sufiĉe multnombra ligiĝo de judoj kun progresivaj movadoj, partioj, kies celo estis kontraŭstari al maljusteco. Ili aktivis favore al forigo de ĉiuspeca ŝovinismo.

La Zamenhof-familio apartenis al la plej progresemaj. La patro de d-ro L. L. Zamenhof, Marko Zamenhof, estis ligita kun Haskala, intelekt-socia direkto, movado, kies celo estis klerigo kaj entute vastasence progreso. La Zamenhofoj vivantaj en pluretna Bjalistoko, kie ne forestis konfliktoj, estis aparte varme inter si ligitaj. Grave ludis la zorgo pri altnivela klerigo de la infanoj.

En tiu amika etoso formiĝis karakterizaj trajtoj de la familianoj, stimulantaj al aktivado, kies celo estis plibonigo de la mondo. La reganta sinteno inter la familianoj esprime estis kompato al tiuj, kiuj bezonis helpon, traktado de aliaj amike kaj kompreneme.

En tia etoso kreskis kaj edukigis Ludoviko Zamenhof, same liaj gefratoj. Nemirige do, ke en la kapo de la sentema kaj tre inteligenta knabo koviĝis pensoj kaj ideoj pri nepro agi, fari ion, por ke la homoj vivu akorde, amike, kiel okazis en lia kaj aliaj familioj, kun kiuj ĝi estis parenca, kaj ankaŭ pli vaste restis en amikaj rilatoj.

[...]

La apuda teksto de Zofia Banet-Fornalowa estas eltraĵo de ŝia artikolo *Postparolo – Pri Homaranismo kaj la Familio* Ĝi aperis 2010 en la kajero HOMARANE 1, LF-koop, La Chaux-de-Fonds